



**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60** €. • Familia: **70** €. • Juna (ĝis 30 jaroj): **20** €.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**OKTOBRO-DECEMBRO 2024** **Nro. 141 (4/24)**




Alproksimiĝas la naskiĝtago (15/12/1859) de la kreinto (aŭ laŭ lia propra deziro, "iniciatoro") de Esperanto. Kiel kutime, ni kunmemoros tion per kunveno en nia sidejo.
Tago: Sabato 14a de decembro.
Horo: 19:00.

**LOKE**

# KRISTNASKA LOTERIO 2024.




Unu fojon plian ni memorigas vin pri la tradicia kristnaska loterio de nia E-Grupo. La ĉi-jara numero estas **79.564** kaj la biletoj estas tute esperantigitaj.

**<u>Ĉiu bileto kostas 5 €</u>**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

**<u>Atentu, ke oni rezervas biletojn al neniu</u>**.

**<u>Lasta tago por aĉeto: sabato 14a de decembro</u>**.

**<u>Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto</u>**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la **<u>skanitajn</u>** biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankokonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li/ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.




**<u>Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: sábado 14 de diciembre. No se reserva.</u>**

Para ello,hay que seguir los siguientes pasos:

1. Ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**. **<u>Cada billete cuesta 5 €</u>**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.
2. Enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** dando cuenta del ingreso.
3. Enviaremos los billetes, **<u>escaneados</u>**, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**LOKE**

## Pri la alproprigo de nia sidejo.





Kiel sciate pro antaŭaj informoj niaj, daŭrigas la demarŝoj cele al atingo de la propraĵo de nia sidejo. Ĝi, pro diversaj historiaj kialoj jam klarigitaj en diversaj kunvenoj, apartenas al nun ne ekzistanta sindikato de antaŭ la hispana interna milito (1936-39).

Ni dungis advokaton, kiu prezentis plendon ĉe juĝejo. Tiu plendo estis oficiale akceptata la 10an de septembro 2024.

Juĝisto fiksis la 21an de oktobro 2025 (jes, vi bone legis!) por okazigi aŭdiencon.

Post tio, nur restos eldiri verdikton.

## NE FORGESU!!




Ne forgesu ke la **sabaton 14an de decembro**, je la **19:00 h.**, ni renkontiĝos en nia sidejo por kunmemori la naskiĝdatrevenon de Ludwik Lejzer Zamenhof. Same oni faros tra la tuta mondo.

Post mallonga prelego, ni kunsidos por interparoli kun konatuloj, informiĝi pri la lastaj novaĵoj okazintaj en la Grupo, ktp.

Ankaŭ ne forgesu ke tiu tago estos la lasta por aĉeti nian kristnaskan loterion ( kaze ke ankoraŭ restos biletoj).

Familianoj kaj amikoj, kvankam ne membroj de nia asocio, ankaŭ estos bonvenaj.

## Pago de kotizoj 2024.

Kelkaj el vi forgesis pagi vian kotizon por la jaro 2024. Bonvolu fari tiun pagon kiel eble plej baldaŭ ĉar la financa situacio de la Grupo ne estas feliĉiga.

Kotizoj estas:

| | |
|---|---|
| Familia: | 70,00 eur./jare |
| Normala: | 60,00 eur./jare |
| Juna (Ĝis 30 jaroj): | 20,00 eur./jare |

Konto por enkontigi la monon:

IBAN: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**
Kontoposedanto: Grupo Esperantista de Bilbao.

## Pago de cuotas 2024.

Si se te ha olvidado pagar la cuota de socio del Grupo de este año, ahora es buen momento para hecerlo, antes de que acabe 2024. Arriba tienes los importes y el número de cuenta donde hacer el ingreso.

Y recuerda que nuestra situación económica es delicada.

**LOKE**

## Kunveno de eŭskaj esperantistoj.



Rafa Blanco organizis la eŭskan aŭtunan renkontiĝon. Ĝi okazis en Arbizu, proksime de Altsasu (Navaro) la 16an kaj 17an de novembro.

Estis programitaj ekskurso tra montaro kaj arbaro kaj vizito al proksimaj vilaĝoj.



Fiesta Esperantista en San Sebastián. Grupo de los reunidos en ella

Kaj jen alia kunveno de vaskaj/eŭskaj esperantistoj, sed en 1908.
(Ĵurnalo de Bilbao "El Nervión" (30/08/1908)

**HEF**

## Hispana Kongreso en Soria.



Hispana Kongreso disvolviĝos inter la 1a kaj la 4a de majo 2025 en unu el la plej malgrandaj provincaj ĉefurboj de Hispanio: Soria. Ĝi estas la dua plej malgranda post Teruel.




Soria troviĝas pli-malpli en la centro de la iberia duoninsulo. Ĝi havas nuntempe ĉirkaŭ 40.000 enloĝantojn. Tamen, troviĝas en regiono kun vere riĉa historio jam de antaŭ la alveno de romianoj al Iberio.

Ĉiuj detaloj pri la kongreso (aliĝilo, programo, ekskursoj, aliĝintoj, ...) vi trovos en https://kongreso.esperanto.es/

Kaj memoru ke ĝis la 31a de decembro vi rajtos favorajn kondiĉojn pri aliĝo.

Je la 21a de novembro estis 21 aliĝintoj.

## Inundoj en Valencio.

La 29an kaj 30an de oktobro, post scio pri teruraj inundoj okcidente kaj sude de la urbo Valencio, multaj el ni faris la saman demandon al ni mem: "Kio pri niaj samideanoj de tiu bela regiono?"

Feliĉe, la 1an de novembro alvenis trankviligan jenan mesaĝon pere de reta informejo de HEF:

"Laŭ informo de Luis Salag, valencia esperantisto, "ĉiuj valenciaj esperantistoj fartas bone"".

Ni memoru ke la ĉi jaran hispanan kongreson oni okazigis en septembro en la urbo Cheste (Ĉeste), kiu ankaŭ suferis superbordiĝon de rivero.

## Konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto.

Dum la Hispana Kongreso en Cheste, oni anoncis la starigon de konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto, je la nomo "Francisco Máñez" (pioniro de la lingvo en la urbo). Ĝi estis lanĉita de la Kultura Societo Ateneo La Alianco el Cheste, kun la kunlaboro de la urbestraro de Cheste, la Fondaĵo Cajacheste, la Esperantista Grupo Lumradio de Cheste kaj la Grupo Esperanto de Valencio.

Oni disdonos tri premiojn, kun mona valoro de 1000, 600 kaj 400 eŭroj. La limdato estas la 31a de decembro.

## CSIC-Kalendaro.

Por 2025 denove estos traduko al Esperanto de la scienca kalendaro eldonita de CSIC, la hispana Supera Centro por Sciencaj Esploroj. Tradukon faris Toño del Barrio, Manolo Parra kaj Jesús Miguel García. Kiam ĝi aperos, HEF informos.

**HEF**

## Vigla agado en Kastilio kaj Leono.



Tiu ĉi jaro povas esti la okazo por Esperanto en la regiono Kastilio kaj Leono. Krom la kongreson en Sorio, ni povas mencii du altirajn novaĵojn kiuj komenciĝis en oktobro.

En la historia urbo **La Granja de San Ildefonso** (provinco Segovio) eblas viziti ekspozicion pri Esperanto en la municipa Kulturdomo, kiu ĵus estis plilongigita ĝis la 18a de oktobro. Samtempe komenciĝis kurso de Esperanto, instruata de nia samideano **David Trigo**, kiu disvolviĝos ĝis la monato decembro. Ili estas la unuaj aktivaĵoj de la ĵus fondita **Segovia Asocio de Esperanto**.

En la urbo **Leono**, ties **Universitato** kunvokis kurson de Esperanto, kiu daŭris la tutan monaton oktobron. Ĝin instruas la esperantisto kaj profesoro de la Universitato **Francisco Balibrea**, kun la kunlaboro de la profesoro pri filologio Francisco Javier Grande.

*("La Bitbulteno" de HEF. Num. 96. Okt. 2024)*

## Novaj kursoj de Esperanto en la universitato UNED.

Danke al interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF), ekde la akademia jaro 2018-2019, la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) pere de sia Lingva Fakultato estas la sola eŭropa universitato kiu enmetis Esperanton inter siaj lingvaj kursoj, ĉe la sama nivelo ol la kataluna, la eŭska, la araba aŭ gesto-lingvo.

Sekvante la Komunan Eŭropan Referenckadron, tiu kiu trapasas ĉiun kurson ricevas UNED-atestilon, kiu estas akceptata en ĉiuj UNED-gradoj postulantaj lingvan atestadon. Aliaj institucioj povas laŭvole akcepti la atestilon. Ekde la akademia jaro 2020-2021 ekzistas du niveloj, A2 kaj B1; nivelo A2 fakte kovras ankaŭ tiu A1 kaj taŭgas por komencantoj.

La kursoj estas adekvataj **ankaŭ por homoj loĝantaj ekster Hispanio**. Je nivelo B2 la tuta studmaterialo estas nur en Esperanto. UNED havas centrojn en multaj landoj de Latinameriko, kaj ankaŭ en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj, kie vi devas fari nur la finan skriban ekzamenon. La procezon por enskribiĝo oni devas fari en la hispana, sed eblas utiligi ankaŭ la anglan (aŭ vi povas kontakti kun HEF se vi havas lingvajn problemojn).

La kursoj daŭras de novembro ĝis majo kaj disvolviĝas tute per interreto, pere de la Virtuala Kampuso de UNED, krom la fina skriba ekzameno. Instruado estas nesinkrona sed ekzistas forumoj por interagi kun aliaj studentoj kaj virtualaj oficejaj horoj por instruado. Krome, instruado inkluzivas unu horon monate de laŭvola videokonferenca konversacio kun profesoro kaj aliaj studentoj. Por la akademia jaro 2024-25, la jara aliĝkosto estis 248 €, sed membroj de HEF ĝuas rabaton kaj pagas nur 164 €.

(El la retejo de HEF: https://www.esperanto.es/eo/nova-eldono-de-la-kursoj-de-esperanto-en-la-universitato-uned/

## KIAL NE ALIĜI AL HEF?

Hispana Esperanto-Federacio malfermis jam sian novan kampanjon de aliĝo al la asocio por la jaro 2025.

Oni povas trovi la retan aliĝilon ĉe: http://www.esperanto.es/inscripcion.

Kaj oni povas legi kialojn por aliĝi al la asocio en tiu ĉi paĝo: http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kial-aligi

Memoru ke nia asocio estas neprofitcela kaj nur kalkulas je la kotizoj de siaj anoj por antaŭenigi la disvastigon de Esperanto. Krome, pro la deklaro de "publika utileco", la kotizoj kaj aliaj donacoj al la Federacio ĝuas altajn fiskajn avantaĝojn. Skribu al admin@esperanto.es se vi deziras koni la detalojn. Ni atendas vin ĉiujn!

*(Hispana Esperanto-Federacio. http://www.esperanto.es/ )*

Os recordamos que la cuota anual de socio de HEF es de sólo 40,00 euros anuales (30,00 si se decide recibir "Boletín" en formato digital), con descuentos para los jóvenes de menos de 30 años y para los que tengan dificultades económicas.

Por otra parte, al ser una asociación de utilidad pública, al hacer la declaración de la renta (**IRPF**), en Bizkaia, se tiene derecho a una **deducción del 30%** de la cuota de socio. Esa deducción aparece, automáticamente, en el borrador del IRPF que remite la Diputación Foral de Bizkaia.

## TRA LA MONDO ...

## Rusaj hakistoj atakas Monaton.




Dum la lasta semajno rusiaj hakistoj atakas plurajn retejojn en Belgio. Inter tiuj troviĝas ankaŭ la retejo de la magazino ***Monato***, kiu en la lastaj tagoj estis nur intermite alirebla.

Monato aperigis kritikajn artikolojn pri la rusia invado de Ukrainio.

Laŭ Paul Peeraerts, multjara kunlaboranto kaj ĉefredaktoro de *Monato*, la belgia ŝtata aŭtoritato pri reta sekureco telefone kontaktis la respondeculojn, atentigis pri la okazanta atako, kaj promesis poste doni pliajn informojn.

Krom la retejo *Monato* estis trafitaj kelkaj aliaj retejoj de amaskomunikiloj, sed ankaŭ ekzemple la retejoj de la flandria parlamento, la asocio por protektado de aŭtoraj rajtoj kaj la presista asocio.

*(Libera Folio. 2024-10-12)*

## TRA LA MONDO …

### Forpasis István Nemere.




La 15an de novembro, 80-jaraĝa, forpasis la fama hungara verkisto István Nemere. Aŭtoro de ĉirkaŭ 800 libroj, inkluzive de pli ol 20 libroj en Esperanto (parte reverkitaj el la hungara) Nekrologon legeblas en La Ondo de Esperanto: https://sezonoj.ru/2024/11/nemere-2/

*(Vacapa kanalo Esperanto)*

### 110-a UK, Brno: temo, emblemo, LKK, kongresejo.

Pli ol 200 homoj el 40 landoj jam aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta de la **19-a ĝis la 26-a de julio 2025** en **Brno (Burno)**.

Oni atentu, ke okazis ŝanĝoj en la datoj de la aliĝperiodoj de la UK. La unua (plej favorpreza) aliĝperiodo nuntempe finiĝas la 30-an de novembro. La tria aliĝperiodo finiĝas la 30-an de junio.

Plenajn informojn oni trovas ĉe uea.org/kongresoj/kotiztabelo. La kongresa temo de la 110-a UK estas “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”.

La emblemo de la 110-a UK reprezentas la Katedralon de Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo, imponan romkatolikan konstruaĵon, kiu elstaras en la pejzaĝo de la urbo, kaj gravan nacian kulturan monumenton en Ĉeĥio.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. Num. 1195. 03/11/2024)

### Kristo Redemptoro verde lumigota la 15-an de decembro.



La statuo Kristo Redemptoro, 38 metrojn alta, verŝajne estas la plej rekonata brazila monumento.

Elektita unu el la novaj 7 Mirindaĵoj de la Mondo en la kampanjo de 2007 de la Fondaĵo “New 7 Wonders” (N7W), ĝi situas en la urbo Rio-de-Ĵanejro (aŭ Rio), sur la monto Korkovado, 710 metrojn alta, pro kies pozicio ĝi videblas de la tuta urbo kaj eĉ de aliaj urboj, kiel la najbara urbo Niterojo.

La venontan 15-an de decembro, okaze de la Zamenhof-Tago, la Kristo estos verde lumigita kiel parto de informa agado por Esperanto.

La lumigo okazos danke al aktivuloj de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ) kaj Niteroja Esperanto-Klubo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. Num. 1194. 02/11/2024)

**LA E-GRUPO DE BILBAO TUTKORE DEZIRAS, AL LA TUTA HOMARO, TRE SUKCESAN, PACAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2025-AN.**